

BRAZILA ESPERANTISTO

67-a Jaro

SEPTEMBRO-DECEMBRO 1973

N.º 714-717

Oficiala organo de **Brazila Esperanto-Ligo**, Societo de publika utileco (dekreto N. 4356, 26 Oktobro 1921). Jarabono eksterlande: 15 respondkuponoj. Sidejo: **Praça da República, 54, 2.º** —

Telefona: 232-6309 — RIO DE JANEIRO — BRAZILIO

Respondeca redaktoro (redactor principal): **D-ro Carlos Domingues**



RIO DE JANEIRO

Arkoj de Carioca — Bela monumento de la XVII — a jarcento, kiu ligante la montetojn Santa Teresa kaj Santo Antonio alportis akvon ĝis Placo Carioca. En 1896 Arkoj de Carioca estis ŝanĝitaj al viadukto.

KONVERSACIO (XIII)

KOMUNIKVOJOJ

— Komunikvojo aŭ veturvojo povas esti: tera — aŭtovojoj, aŭtoŝoseoj, fervojoj, tramvojoj — akva, mara kaj aviadila aŭ aera.

— Fervojo inkluzivas la relvojojn, rulmaterialon, staciojn kaj signalsistemon; kaj la relvojo?

— Paron da reloj, ŝpalojn, relŝanĝilojn kaj la gruzan balaston.

— Rulmaterialo estas la lokomotivoj kaj vagonoj...

— Jes. Vagonaro estas serio da kunkroĉitaj vagonoj — pasaĝervagonoj, litvagonoj, restoracivagonoj, salonvagonoj, pakajvagonoj, poŝtvagonoj, varvagonoj, platvagonoj, ktp. Trajno inkluzivas lokomotivon kaj tendron; ĝi povas esti rapida, ekspresa aŭ senhalta, pasaĝera aŭ ŝarĝa.

— Lokomotivoj estas vapormovaj, elektraĵoj aŭ dizelaĵoj...

— Personaro de trajno estas la trajnestro, lokomotivestro kaj helpantoj, kaj la konduktoro, kiu kolektas la biletojn.

— Stacio estas loko, kie la trajno haltas, dum stacidomo estas konstruaĵo, sur kies kajoj pasaĝeroj atendas forveturon kaj alvenon de la vagonaroj. Tie ili aĉetas la biletojn kaj deponas siajn pakajojn.

— Sed estas vagonaroj laŭ aliaj tipoj; ĉu ne?

— Jes. En urboj estas subfervojoj aŭ subteraj metrooj kaj superfervojoj aŭ superteraj metrooj.

— Krome estas motorvagonoj, ŝnurvagonoj, telferoj, ktp.

— Unurelaj trajnoj estas rapidegaj...

— Sur akva kaj mara vojo la pramoj transveturigas de unu bordo al alia kaj ŝiplinioj transportas de unu haveno al alia. Estas transoceanaj kaj bordirantaj ŝipoj.

QUOTA ANUAL DE ADESAO A LIGA BRASILEIRA DE ESPERANTO

	Cr\$
M 1 — além das vantagens de sócio, recebe a carteira e o <i>Brazila Esperantisto</i>	35,00
M 2 — recebe o mesmo que o M1. Paga uma quota mais alta para auxiliar a B.E.L. e o movimento	50,00

Essas quotas correspondem ao ano civil.

Taxas dos Cursos

<i>Curso Elemental</i> — Contribuição única:	120,00
50% desse valor deverá ser remetido com o pedido de inscrição; o restante, com a remessa da 6. ^a lição.	

<i>Curso Superior</i> — Contribuição única:	200,00
50% desse valor deverá ser remetido com o pedido de inscrição; o restante, com a remessa da 10. ^a lição.	

<i>Curso Magistral</i> — Contribuição única:	300,00
50% desse valor deverá ser remetido com o pedido de inscrição; o restante, com a remessa da 15. ^a lição.	

Todas as importâncias devem ser remetidas em cheque pagável no Rio de Janeiro à

LIGA BRASILEIRA DE ESPERANTO
PRAÇA DA REPÚBLICA, 54, 2.^o
Rio de Janeiro, GB

Amuzaj Dialogoj en
Esperanto
Albert Lienhardt
Cr\$ 14,00

— Aerlinioj transportas de flughaveno al flughaveno, kie aviadiloj alteriĝas kaj ekflugas. Aerŝipojn oni ne uzas nuntempe, kaj helikopteroj nur komencas esti uzataj komerce.

G. P.

Neutralidade

Em 1916, na Faculdade de Direito e Ciência de Buenos Aires, Rui Barbosa pronunciou a célebre conferência *Problemas de Direito Internacional* ou *O dever dos neutros*. Censurava a indiferença dos neutros ante a guerra européia provocada pela Alemanha, em desrespeito às convenções e aos tratados.

“Entre os que destroem a lei e os que a observam não há neutralidade admissível. Neutralidade não quer dizer impassibilidade: quer dizer imparcialidade; e não há imparcialidade entre o direito e a injustiça. Quando entre ela e ele existem normas escritas que os discriminam, pugnar pela observância dessas normas não é quebrar a neutralidade; é praticá-la. Desde que a violência pisa aos pés arrogantemente o código escrito, cruzar os braços é servi-la. Os tribunais, a opinião pública, a consciência não são neutros entre a lei e o crime. Em presença da insurreição, neutralidade não pode ser abstenção, não pode ser a indiferença, não pode ser a insensibilidade, não pode ser o silêncio.” (*)

Estas palavras são ainda atuais, como a verdade, porque eternas. Elas nos dão o sentido e os limites da neutralidade.

Com efeito, entre duas correntes de pensamento, só podemos permanecer neutros dentro dos limites da justiça. Entre atitudes antagônicas, não podemos ser neutros mas impar-

ciais. Chamados a opinar não devemos ser neutros, pois não podemos ser indiferentes. Não podemos ser neutros entre a verdade e a mentira, a precipitação e o bom senso, a fidelidade e a infidelidade, a lealdade e a deslealdade.

A palavra neutralidade, largamente usada no movimento esperantista, significa que, nas sociedades que lutam pela divulgação da Língua Internacional, não devemos tratar de assuntos alheios aos problemas lingüísticos para não comprometer a causa mesma. Mas nós esperantistas, como indivíduos, não somos neutros porque todos temos idéias políticas, religiosas e filosóficas próprias. E como indivíduos e esperantistas assiste-nos o dever de escolher o caminho a seguir: lutar pelo Esperanto como fim ou através dele como meio de divulgação de nossas idéias.

Na última hipótese, a neutralidade estará prejudicada pela ideologia espositiva e então pertenceremos a uma das muitas associações especializadas, chamadas *fakaj asocioj*.

No primeiro caso, a neutralidade está limitada pela imparcialidade, porquanto devemos impedir que se intrometam no movimento idéias estranhas à causa esperantista, ainda que nobres e ainda que nós mesmos a elas estejamos filiados.

Se meditarmos profundamente, obteremos que o esperantista não pode ser indiferente à discriminação lingüística e então ele estará também aqui longe de ser neutro.

(*) Rui Barbosa, *Ensaio Biográfico*, Fernando Nery, pág. 151.

Brazila Kroniko

GOIAS

Goiânia — Jen la nova estraro de *Instituto Goiano de Esperanto*: Prez.: D-ro Raul Conde; Vicprez.: Vero Aldo Campelo; 1-a Sek.: Genezio Alves Pereira; 2-a Sek.: Sebastião Antonio Queiroga; 1-a Kas.: Welton J. C. Adorno; 2-a Kas.: Frederico Pinto Cedro; Bibl.: Francisco M. Sobrinho; Direktoroj: Mário Fonseca (Instruado), Domervil J. Teixeira (Administ.), Sílvia P. Franco (Sporto), J. Tormin (Propagando); Konsilantaro: Alberto José Centeno, Umberto Ferreira, Antonio de Lisboa B. Pereira.

GUANABARA

Rio de Janeiro — En Majo lasta *Brazila Klubo "Esperanto"* rekomendis serion da kulturaj kunvenoj. La 12-an de Majo Prof. Sylla Chaves prelegis pri la diversaj formoj kiel oni povas diskonigi Esperanton: li interalie prezentis filmon kaj diskon en la Internacia Lingvo. Du semajnojn poste, Diderto Freto prezentis la duan volumon de sia libro pri monosilabaj sonetoj kaj faris interesan resumon pri tiu malfacila, nemulte konata ĝenro de poezio.

Brazila Esperantisto kore gratulas la prelegintojn pro la alta nivelo de tiuj du kunvenoj kaj deziras al la Klubo pluan sukceson en ĝiaj aktivecoj.

PERNAMBUCO

Recife — Por la periodo 73/75 en Majo lasta, estis enoficigita jena

estraro de *Associação Pernambucana de Esperanto*: Prez.: Amaro Pinangé Soares; Vicprez.: Aureci Apolônio Silva; Ĝen. Sekr.: Prof. J. M. Mabe-soone; Vicsekr.: Arnon Ribeiro; Kas.: F-ino Olberes Simões; Vickas.: José Inácio Pessoa; Bibl.: Gabriel de Oliveira. Kontr. Kons.: Rosete Pinto kaj Zuila Lins.

SÃO PAULO

Santos — S-ro F. S. Almada, prezidanto de Centro Esperantista de Santos, informis, ke D-ro Raul Conde, prezidanto de Instituto Goiano de Esperanto, partoprenis gravan kurson de la Somera Universitato en Liège, Belgujo.

La kurso, en kiu nur Esperanto estas uzata, okazis de 30-7 ĝis 27-8-72.

D-ro Raul Conde estas profesoro de Homa Anatomio kaj Veterinararto en Federacia Universitato de ŝtato Goiás.

ESPERANTO

na Imprensa do Brasil

Publicaram notas ou informações em ou sobre o Esperanto os seguintes periódicos:

— *Diário de Pernambuco*, Recife, 31-5-73, 21-7-73, 22-7-73, 8-8-73.

— *A Gazeta*, Vitória, 16-7-72, 30-7-72, 6-8-72, 13-8-72, 20-8-72, 27-8-72, 24-9-72, 26-11-72. Artigos de N.L. Montenegro e Gilson Passos. Esse último rebate admiravelmente as críticas de J.A. Carvalho ao Esperanto.

— *A Tribuna*, Taubaté (SP), 17-6-73, 1-7-73, 27-7-73.

— *Matutino Popular*, Caçapava (SP), 31-7-73.

— *Notícia*, Lavras (MG), 9-8-73.

RECENZO

INTERNACIA KUIR-LIBRO —
Kompilita de Jahanna Sorter-
Eyck — Eld. Brita Esperantis-
ta Asocio, Londono — 194 pa-
ĝoj — 20 cm x 12 cm.

Jen libro, kiun ni devas ne legi sed gustumi. En Esperantujo estas libro por ĉio: amo, distro, ludo, instruo; libro por la antaŭdormo, por la sendormo, por la vekiĝo; por la koro, por la okuloj, por la spirito. Nun aperas libro por la buŝo.

Libro pri receptoj estas libro ŝatata. Iuj ĝin ŝatas kiel gastronomoj; aliaj, kiel neĉiutagaj kuiristoj, sed ĉiuj unuanime serĉas en ĝi maloftajn manĝaĵojn, kiujn ili ankoraŭ ne konas. Tiu ĉi "Internacia Kuir-Libro" estas ĉiel bonvena.

Ĝi entenas, entute, 500 receptoj el 100 regionoj de la mondo, flanke indikataj. Pro la amplekso ĝi estas kompleta: supoj, almanĝaĵoj, fiŝaĵoj, legomoj, saŭcoj, ovaĵoj, fromaĝoj, salatoj, pudingo kaj desertoj, birdoj kaj ĉasaĵoj, bovaĵoj, ŝafaĵoj, porkaĵoj kaj kukoj. Nu, estas manĝaĵoj por ĉiuj gustoj kaj ebloj, eĉ por esperantistoj, kiuj, pro religio aŭ alia emo, restas ĉe la ŝtupo de vegetaĵoj.

Ne temas pri traduko, sed pri kompilo. S-ino Shorter kolektadis receptojn dise ekzistantajn tra la mondo. Ŝi uzis ankaŭ tiujn de "500 Receptoj el Alilando", de Marguerite Patten, kaj "La Internacia Kuir-Libro", de Ambrose Heath.

Tiu libron ni ne lasu en la libroŝranko sed sur la forno.

Bonan apetiton!

Joel Manso

BIBLIOGRAFIO

Jawa Roadster 90, Maped babetta Jawa 50 Typ 20-21, 23 A Mustang estas prospektoj de la fama motoklofabrikanto Jawa. Ili estas bele kolorigita kun detalaj teknikaj informoj.

* * *

Bonvenon al Gotenburg! Bela prospekto de la fama urbo Gotemburgo, Svedujo. Eldono: Inter-Agadgrupo por Esperanto. Kunlaboro: Turist-
trafika Asocio de Okcidenta Marbordo, Gotemburgo. Informo ĉe Turista Oficejo, Parkgatan 2, S-41138 Gotemburgo, Svedujo.

* * *

Esploroj. Baldur Ragnarsson. Kovrilo de Jan Schaap Jr. Stafeto: Beletraj Kajeroj, 44. J. Régulo, Eldonisto. La Laguna, Tenerifo, 1973. 12 x 18 cm 123 p.

Poemoj originale verkitaj en Esperanto. De la aŭtoro jam aperis en la Internacia Lingvo *ŝtupo sen Mono*, *Sub Stelo Rigida* kaj *Islandaj Pravoĉoj*.

* * *

Ni kaj Ĝi. Eseo III. Gaston Waringhien. Kovrilo de Jan Schaap Jr. Stafeto: Belliteratura Serio, 30. J. Régulo, Eldonisto. La Laguna, Tenerifo. 1973. 12 x 18 cm 123 p.

Eseo pri religio kaj arto de la fama akademiano G. Waringhien.

* * *

Vojo kaj Vorto. Roberto Passos Nogueira. Antaŭparolo de William Auld. Kovrilo de Jan Schaap Jr. Stafeto: Beletraj Kajeroj, 41. J. Régulo, Eldonisto, La Laguna, Tenerifo. 1972 (1973). 12 x 18 cm. 111 p.

Poemoj originalaj kaj tradukitaj kun eseo de la aŭtoro pri moderna poezio kaj Esperanto.

... *Kun Siaspeca Spico!* Raymond Schwartz. Kovrilo de Jan Schaap Jr. Stafeto: Belliteratura Serio, 29. J. Régulo, Eldonisto. La Laguna, Tene-rifo, 1971 (1873). 16 x 22 cm 216 p.

Prozaj kaj versaj humoraĵoj ori-ginalaj kaj 20 kronikoj titolitaj *Laŭ mia...* *ridpunkto* sinsekve aperintaj dum 20 jaroj en "Sennacieca Revuo".

* * *

La Bambufluto. Novelaro. Diversaj aŭtoroj. Fremdlingva Eldonejo. Ha-nojo. 1973.

Ĝi estas kolekto da noveloj de konataj verkistoj de Sud-Vjetnamio, interalie Nguyen Thi, Anh Duc, Duong Thi Minh Huong, k. t. p.

* * *

La Participa Problemo en la Aka-demio. Dokumentaro kompilita kaj komentita de Ebbe Vilborg. Eldono de Lingva Komisiono 1973.

Kolekto de la ĉefaj dokumentoj de la tempisma flanko kaj de la pripar-ticipaj estraraj cirkuleroj. Ĝi enha-vas koncizan bibliografion pri la temo.

* * *

Clave de Esperanto. Esperanto-ŝlosilo. Hispana. Alberto Gomes Cruz. Dua eldono reviziita. 1973. Apartado 1-664, Guadalajara, Jal., Meksikio.

Esperanta ŝlosilo por hispanlingva-noj, kun vortaroj Esperanta-hispana kaj hispana-Esperanta.

* * *

Esperantonimoj, Marinko Ĝivoje. Teknika aranĝo: Giorgio Silfer. Ko-vrilpaĝo: James Rivière. Karikatu-ristoj: Giancarlo Mangini, Mitko Ba-

kalov, Sliven, Joze Srebrniĉ, Nova Gorica. Presita en Italujo ĉe Ital-copy, Cinisello Balsamo. Kopirajto ĉe la aŭtoro.

Unua verko pri listo de antonimoj, homonimoj, paronimoj, sinonimoj kaj vortludoj.

ESPERANTO NO ESTRANGEIRO

Austrália — A Agência Oficial de Notícias da Austrália acaba de editar novo filme documentário a cores (16 mm, 20 min). O filme — *A Austrália na década de 70* — mostra a evolução econômica do país em estilo moderno.

Bulgária — O Comitê Distrital de Esperanto, em Smoljan, construiu se-de própria. A partir do verão de 1973, a residência acolhe 52 pessoas para estudos e repouso.

A Agência Turística Estatal "Bal-kanturist" programou para julho des-te ano um centro de férias para esperantistas de todos os países. O encontro intitula-se "Repouso e Saú-de".

Checoslováquia — No *Hotel Espe-ranto*, em *Pribylina*, teve início um curso da Língua Internacional para treino e aperfeiçoamento do pessoal do Hotel.

Estados Unidos — Fundou-se, em Toledo, a Associação Esperantista In-ternacional de Bibliotecários, que congrega bibliófilos, professores, bi-bliotecários e estudantes. Escritório: 1032 Orchardt S.T. — Toledo, OH 43609.

— O Esperanto está sendo ensina-do a aproximadamente 9.000 (60%) alunos da 6.^a série do primeiro grau, em todas as escolas públicas do

Havai. O programa completo dura de 20 a 25 dias, com lições em 5 dias da semana. Como material didático são usados jogos, filmes, fitas e livros.

França — Editada pelas "Editions Martignon" surgiu em Paris a versão francesa da obra de ciência popular, *Senĝenaj Dialogoj*. Escrita originalmente em Esperanto por Alberto Fernández, recebeu em francês o título *Dialogues Insolites*.

Hungria — Na sede da Associação Húngara de Esperanto, estão sendo realizadas, desde março, reuniões para crianças de menos de 6 anos de idade. As reuniões realizam-se aos sábados, 7,30 h às 14 h, à guisa de creche para esperantistas desde o berço.

Inglaterra — Completou 60 anos em outubro o "Serviço Divino em Esperanto em Londres", fundado por Montagu Butler. Realizados inicialmente em casas particulares, os serviços são oficiados atualmente na Igreja Protestante Francesa de Soho.

Itália — Dois casamentos foram celebrados na Itália — um em Roma, outro, em Verona — na Língua Internacional, no ano passado. O celebrante, Padre Jacobitti, usou o Esperanto tanto na missa, quanto no ritual, em ambos os matrimônios.

Noruega — A Associação Norueguesa de Escoteiros autorizou à Liga de Escoteiros Esperantistas a trabalhar no campo da difusão do Esperanto, durante o "jamboree" mundial que reunirá naquele país, no verão de 1975, cerca de 15.000 escoteiros de 90 países, quando serão usadas 60 a 70 línguas. Os interessados podem dirigir-se ao Sr. I. Berggren, Bratvollveren, 23 C — Nordstrandhogda — Oslo 11, Noruega.

ANONCETO

— *S-ro Donald L. Curry*, 4824, Clara Ap. 11, Cudahy, Califórnia 90201, Usono, deziras korespondi kun brazilaj esperantistoj.

— *Edward Williger*, 996 Amarillo Av., Palo Alto, Califórnia 94303, Usono, dez. kor. pri Brazilo.

— *Jan Ferenc*, ul. Broniewskieg nr. 1 m. 28, 62-510 Konin 2, Pollando, dez. interŝ. p.m.

— *Maria Sönkens*, 85-115 Bydgoszcz, Ul. Wiatrakowa 10, Pollando, dez. kor. pri muziko, filmo, literaturo, k.c.

— *Irena Szarek*, 85-023 Bydgoszcz, Ul. Torunska 17/3, Pollando, dez. kor. speciale pri teatraĵo.

— *Medicina 22* — *jara studento* dez. kor.: Jacek A. Kolmán, Varsovio-1, Str. Okopowa 23/97, Pollando.

— *Ekonomiistino* dez. kor.: Szűcs Irene, Oradea, Str. Borsei Nr. 41, Rumanujo.

— *S-ro Michel Leon*, 171 Oxford Terrace, Lower Hutt, Nov-Zelando, dez. kor kun brazilaj esperantistoj. Nepra respondo.

— *Geknaboj 13/14* — *jaraĵ*, dez. kor. kaj interŝ. bildkartojn. Skribu al la instruisto: L. Schödl, 195 Neuruppin, Rosa — Luxemburg Str. 37, Germana Demokratia Respubliko.

— *Ekkonu la Biblion* per 64 — paĝa "Fonto de l'Vivo" kaj aliaj senpagaj presaĵoj. Esperanto — Misio, Box 7, Östransjö, S — 694 02 Hallsberg 2, Svedujo.

Venezuela — Em Valência, em casa do casal Bachrich, foi fundado o Clube Esperanto de Carabobo. Seu primeiro presidente: José Llorens.

Assembléia Geral Ordinária

No dia 23 de junho do corrente ano, na sede social, reuniu-se em sessão ordinária a Assembléia Geral da Liga Brasileira de Esperanto. A sessão foi presidida pelo Gen. Geraldo Alberto Gomes de Pádua, vice-presidente e secretariada pelos Srs. Luiz Alberto Brandão Martins, secretário geral e Floriano Pessoa, primeiro secretário.

Relatório da Presidência e Balancete da Tesouraria, referentes a 1972 — Foram lidos respectivamente pelo secretário geral e pelo tesoureiro inteiro, tendo sido ambos os documentos aprovados sem discussão.

Diretoria. Cargos vagos — De acordo com a letra b do § 1.º do art. 10 dos Estatutos haviam sido nomeados: tesoureiro o Sr. Joel Vasques Manso na vaga de D. Irani Baggi de Araujo e segundo secretário o Sr. Jorge Campos de Oliveira, em substituição ao Sr. Joel Vasques Manso. Tendo a Assembléia confirmado por unanimidade ambas as nomeações, ficou assim constituída a Diretoria, com mandato até o fim do corrente ano: presidente: Dr. Carlos Domingues; vice-presidente: Gen. Geraldo Alberto Gomes de Pádua; secretário geral: Sr. Luiz Alberto Brandão Martins; primeiro secretário: Sr. Floriano Pessoa; segundo secretário: Sr. Jorge Campos de Oliveira; tesoureiro: Sr. Joel Vasques Manso. Para o Conselho Consultivo foram eleitos por unanimidade os Drs. Carlos Resende e Joaquim do Couto nas vagas dos conselheiros falecidos Srs. Antonio Caetano Coutinho e Octavio Vianna Peixoto. Também por unanimidade o Sr. Rivadávia Pereira de Moraes foi eleito para o Conselho Fiscal, em substituição ao Sr. Jorge Campos de Oliveira.

Voto de pesar — Foi aprovado, pelo

falecimento dos sócios: Araci Baggi de Araujo, Irani Baggi de Araujo, Alberto da Cruz Bonfim, Sebastião José Domingues, Severiano da Fonseca Hermes e Maria do Amaral Mafheiro.

Balancete Referente a 1972

RECEITA

	Cr\$
Saldo de 1971	467,58
Assinaturas	716,00
Comissões	894,90
Contribuições	14.840,00
Cursos	2.170,00
Diversas Receitas	2.599,20
Serviços de Livros	11.429,80
	33.117,48

DESPESA

	Cr\$
Assinaturas	266,93
Biblioteca	200,00
Comissões	675,50
Cursos	141,00
Despesas de Sede	6.186,57
Diversas Despesas	2.388,01
Franquia	650,50
Informação	227,20
Material de Expediente	173,90
Quotas U.E.A.	9.076,30
Revista	3.213,20
Serviços de Livros	1.838,51
Serviços de Secretaria	8.000,00
Saldo para 1973	79,86
	33.117,48

Rio de Janeiro, 2 de janeiro de 1973

Irani Baggi de Araujo
Tesoureira

- AMOR-PRÓPRIO** — Pro *memestimo*, *memrespekto*, *memamo*.
- AMORTECEDOR** — *Bufro* (puŝrisortego) de vagono. 2. *Amortizilo*, *skusorbilo* de aŭtomobilo; *amortizilo* de osciloj.
- AMORTECER** — 1. *Amortizi* oscilojn. 2. *Amortizi*, *sorbi* skuon, vibradon. 3. *Mia kruro nesensivigis*.
- AMORTECIMENTO** — 1. *Amortizo* de la osciloj. 2. *Nesensivigo* de la kruro.
- AMORTIZAÇÃO** — *Amortizado* de la ŝuldo; *pagi amortizadon* de ŝuldo.
- AMORTIZAR** — *Amortizi* ŝuldon.
- AMOSTRA** — *Specimeno* pri la varo; *specimeno* de ies gusto. 2. *Fari provspecimenon* de, *pri* la produkto.
- AMPARO** — 1. La *subteno* de la kolono. 2. *Ricevi subtenon* de la registaro; *pro mona subteno* de la patro.
- AMPELOPSE** — *Ampelopso* (Bot. *ampelopsis*).
- AMPÈRE-HORA** — *Kosto* de *amperhor*; *konsumo* de *energia* je *amperhor*oj.
- AMPÈRE-VOLTA** — *Magnetomova forto* de unu *ampervolvo*; *po unu ampervolvo* je centimetro.
- AMPERÍMETRO** — *Ampermetro* (Ele.).
- AMPLEXO** — *Ricevu fortan ĉirkaŭbrakon*.
- AMPLIAÇÃO** — *Pligrandigo* de foto, bildo.
- AMPLIAR** — 1. *Vastigi* siajn limojn; *plivastigi* la sferon de agado. 2. *Pligrandigi* foton; *pligrandigi* konstruon.
- AMPLIFICAÇÃO** — *Amplifo* de tensio; *koeficiento* de *amplifo*.
- AMPLIFICADOR** — *Amplifilo*; *amplifa stacio*; *amplifikatoro* de tensio. 2. *Plilaŭtigilo* (Aku.).
- AMPLIFICAR** — *Amplifi* (Ele.) *tension*, oscilojn.
- AMPLITUDE** — 1. *Amplitudo* (Ele.) de *varianta* grando, *ondo*. 2. *Amplekso* de salono; *amplekso* de signifo, *katastrofo*; *amplekso* de *variabla*; *voĉo*; *amplekso* de *ideo*.
- AMPLO** — 1. *Ampleksa* (multe *enhavanta*) verko, *termo*, *sciado*. 2. *Vasta* (granda) *ĉambro*, *vesto*, *sciado*.
- AMPOLA** — *Ampolo* de *injektaĵo*.
- AMPUTAÇÃO** — *Fari amputon* de la kruro.
- AMPUTAR** — 1. *Amputi* ies *kruron*. 2. *Detranĉi* *pecon*, *branĉon*.
- AMUAR** — *Koleretiĝi* pro io, kontraŭ io.
- AMULETO** — *Amuleto* kontraŭ ĉia sorĉrigardo.
- AMURA** — *Halso* (por *plistreĉi randon* de velo).
- AMURADA** — 1. *Kajmuro*. 2. *Pavezo*, *ŝiprando*.
- AMURAR** — *Halsi* *velon*.
- ANÁ** — *Anao* (monero).
- ANABATISTA** — *Anabaptisto* (Rel.).
- ANACÁRDIO** — *Anakardio* (frukto de *anarkardiujo*, "*semecarpus anacardium*").
- ANACINÉSIA** — *Anakinezio* (Med.).
- ANACORETA** — *Anakoreto*, *dezertulo*.
- ANACRONISMO** — *Fari anakronismon* (Bele.).
- ANACRUSE** — *Anakruzo* (Muz.).
- ANAERÓBIO** — *Anaerobia* *estajo*.
- ANAFILÁTICO** — *Anafilaksia* ŝoko; *anafilaksia* *reago*.
- ANAFILAXIA** — *Anafilaksio* (Med.).
- ANÁGALIS** — *Anagalo* (Bot. "*anagal*is").
- ANÁGIRO** — *Anagi*ro (Bot. "*anagyris*").
- ANAGLIFO** — *Anaglifo* (bareliefa ornamo: *stereoskopa* foto).
- ANAGRAMA** — *Tiri anagramon* el nomo: *mono estas anagramo* de nomo.
- ANÁGUA** — *Silka subjuĝo*.
- ANAIS** — *En analoj* de la movado.
- ANALÉPTICO** — *Analeptiko* (Med.).
- ANALFABETISMO** — *Kampanjo* kontraŭ *analfabeteco*.
- ANALFABETO** — 1. *Analfabeto*, *nelegoscia viro*; *analfabetulo*. 2. *Tuta analfabeto* pri muziko.
- ANALGÉSIA** — *Analgezio* (Med.).
- ANALGÉSICO** — *Preni analgezikon*, *sendo origilon*; *analgezika*, *sendoloriga* *tabloido*, *pilolo*.
- ANALISAR** — *Analizi* faktojn; *analizi* vorton, *kemiaĵon*.
- ANALISE** — 1. *Fari analizon* de io; *kvan*ta, *spektra* *analizo*. 2. *En lasta analizo*...
- ANALÍTICA** — *Analitiko* (Sci.).
- ANALÍTICO** — 1. *Analitika* *geometrio*. 2. *Per la analiza* metodo.
- ANALOGIA** — 1. *Havi analogion* kun io; *konkludi* pro *analogio*. 2. *Simetria*, *homologa* *analogeco* inter du figuroj.
- ANALÓGICO** — *Analogia* *rezonado*; *analogie* oni *konkludas*, ke...
- ANÁLOGO** — *Analog*a al, je io; *per analog*a procedo.
- ANAMIRTO** — *Anamirto* (Bot. "*anamir*ta").

ANAMITA — *Anama* popolo; *anamano* (log. Anamo).

ANAMORFOSE — *Anamorfozo* (desegnaĵo; aliformigo de figuro).

ANÃO — *Nano*, *malgrandegulo*; *nana*, *malgrandega viro*, *arbo*.

ANAPESTO — Verki *anapestojn* pri glora fakto.

ANARICO — *Anariko* (Zoo. "anarrhichas").

ANARQUIA — 1. *Anarkio* (Pol.). 2. Regas *anarkio* en la societo.

ANÁRQUICO — 1. *Anarkia* reĝimo. 2. Laŭ *anarkia* vivmaniero.

ANARQUIZMO — Adepto de *anarkiismo*.

ANARQUISTA — *Anarkia* reĝimo; *anarkiisma* koncepto; *anarkiisto*, *anarkiulo*; *anarkiista* agado.

ANARQUIZADO — 1. *Anarkiulo*; lia *anarkiula* vivmaniero. 2. Resti *senkreditigita* en la okuloj de la mondo; resti *senkuragigita*, *demoralizita* antaŭ obstaklo, fortulo.

ANASARCA — *Anasarko* (Med.).

ANASTIGMÁTICO — *Anastigmata* lenso.

ANASTOMOSE — *Anastomoza* (Ana.).

ANASTOMÓTICO — *Anastomoza* arterio.

ANASTOMOTIZAR — Ilo por *anastomozigi* arteriojn; la arterio *anastomozigis* kun vejno.

ANÁTEMA — Ĵeti *anatemon* al herezulo.

ANATEMIZAR — *Anatemi* herezulon.

ANATIDEO — *Anasedo* (Zoo.).

ANATOMIA — *Anatomio* de la korpo.

ANATÓMICO — *Anatomia* verko.

ANATOMISTA — *Anatomo*, *anatomisto*.

ANCA — 1. Grupo de ĉevalo. 2. Pugo de homo; pugmezuro de virino.

ANCHOVA — 1. *Engraŭlo* (Zoo.; genro). 2. *Anĉovo* (Kui.).

ANCIÃO — 1. *Grandagulo*, *maljunegulo*; *grandaga*, *maljunega viro*; la *plejaguloj* de la tribo.

ANCINHAR — *Rasti* la foliojn en ĝardeno; *rasti* la bedon.

ANCINHO — Amasigi la foliojn per *rastilo*.

ANCÓNEO — *Ankoneo* (Ana.).

ÂNCORA — 1. Ŝtoko, trunko, ŝpatkrucio, ŝpatoj de *ankro*; ĵeti, levi la *ankron*; stari ĉe *ankro*; *flosankro*; *graplo* (multbranĉa). 2. *Ankro*, *ellasil* de horloĝo.

ÂNCORADO — Ŝipo *ankrumanta* en la haveno; ĝi *ankrumas* en la haveno.

ÂNCORADOURO — *Ankradejo*.

ÂNCORAR — *Ankri* la ŝipon; la ŝipo *ankrigis* en la haveno.

ANADURA — *Irmanieroj* de ĉevalo: galopo, troto, amblo, paŝado.

ANDAIME — *Skafaldo*, *antaŭtrabaĵo* de konstruata domo.

ANDALUZ — 1. *Andaluza* popolo; *andaluzo* (log. Andaluzio). 3. La "*Andaluziaj* Floroj".

ANDALUZITA — *Andaluzo* (log. Andaluzio).

ANDANTE — 1. *Migra*, *vaganta* kavaliro. 2. *Andanto* (Muz.); ludi *andante*.

ANDAR — 1. *Iri* piede, ĉevalo, per veturilo. 2. *Piediri*, *paŝi*, *paŝadi* sencele; *paŝi* sur rozoj, hezite. 3. Vigla *irmaniero*; koketa *movigo*, *irado*. 4. *Veturi* per aŭto, aviadilo, ŝipo; *rajdi* ĉevalon, sur ĉevalo, biciklon. 5. *Vivi* malĝoja, malpura. 6. Dua, intera, tera, subtera, kela *etaĝo*; *beletaĝo*, *ĉefetaĝo*, *teretaĝo*. 7. *Kolegumi* kun junkrimuloj; kun kiu vi *kuniĝas*, tia vi *fariĝas*; *komunikigi* kun malĉastulinoj.

ANDAS — Marŝi per *stilzoj*, *iriloj*, *stangiriloj*, *irbastonoj*, *paŝtangoj*.

ANDINO — *Andea* regiono; *andeano* (log. Andeo).

ANDONE — *Andono* (noktolampo).

ANDORINHA — 1. *Hirundo*; *domhirundo*; *bordhirundo*; *urbhirundo*. 2. Unu *hirundo* printempon ne alportas; *hirunda* nesto.

ANDRAJO — Vestita per ĉifonoj, en ĉifonaĵoj; demeti la ĉifonaĵon.

ANDRAJOSO — Ĉifona vesto; *ĉifonulo*; ĉifone vestita.

ANDRÓGINO — *Androgina* (Bot.).

ANDRÔMEDA — *Andromedo* (Bot. "andromeda").

ANEDOTA — 1. *Spritaĵo* pri papago. 2. Belaj *anekdotoj* pri Napoleono.

ANEDÓTICO — Detalo kun *anekdota* intereso.

ANEL — 1. Meti *ringon* sur la fingron; surfingrigi la *ringon*; fingroringo; edziĝa, fianĉiga *ringo*. 2. *Ringo* de piŝto, piŝtoringo. 3. Ellasi *fumringon* el cigaredo.

ANELAR — La *ringa* fingro. 2. *Bukli*, *ringigi* la harojn; ŝiaj haroj *bukligis*, *ringiĝis*.

ANÉLIDO — *Anelidoj* (Zoo.).

ANÊMICO — *Anemia*, *sensanga* knabo.

ANEMIZAR — Troa laboro *anemiis* la knabon; li *anemiigis*.

ANEMOGRAMA — *Anemogramo* (Mete.).

ANEMÓMETRO — *Anemometro* (Mete.).

ANÉMONA — *Anemono* (Bot.); *maranemono* (Zoo.; aktiniulo).

ANERÓIDE — *Aneroida* barometro.

ANESTESIA — Fari lokan, ĝeneralan

anestezon al paciento; asisti pri la *anestezado*.

ANESTESIIAR — *Anestezi* pacienton.

ANESTÉSICO — Apliki *anestezilon*; *anesteza* drogo.

ANETO — *Aneto* (Bot. "annethum").

ANEURINA — *Aneŭrino* (vitamino).

ANEURISMA — *Aneŭrismo* (Med.); rompiĝo de *aneŭrismo*.

ANEXAÇÃO — 1. Fari *aneksadon* de teritorio. 2. Fari *almeton*, *aldonon* de dokumento.

ANEXADO — 1. *Aneksita* teritorio. 2. Kun *almetita*, *aldonita* kopio.

ANEXAR — 1. *Aneksi* teritorion al lando. 2. *Almeti*, *aldoni* kopion.

ANEXIONISMO — *Aneksismo* (Pol.).

ANEXIONISTA — *Aneksisto* (Pol.).

ANEXITE — *Aneksito* (Med.).

ANEXO — 1. En *almetita*, *aldonita* dokumento; *aldone* mi sendas kopion. 2. Laŭ *Aldono* Ia; la *aneksaĵoj* de la Traktato. 3. *Aneksaĵoj* de la motoro; *aneksaj* organoj de la maŝino.

ANFIARTROSE — *Amfiartro* (Ana.).

ANFÍBIO — 1. *Amfibio* (Zoo.); *amfibia* vivo, besto. 2. *Amfibia* tanko.

ANFIBIOLOGIA — *Anfibioologio*.

ANFIBÓLIO — *Amfibolo* (Min.).

ANFIBOLOGIA — *Amfibologio* (Filo.).

ANFÍBRACO — Verki *anfibrakojn* pri gloraj faktoj.

ANFÍBRAQUICO — *Amfibraka* verso.

ANFINEUROS — *Amfineŭroj* (Zoo.).

AMFITEATRO — 1. Roma *amfiteatro*. 2. Universitata *amfiteatro*. 3. La urbo kuŝas *amfiteatre* sur la deklivo.

ANFITRIÃO — 1. *Amfitriono* (invitinto al festeno). 2. *Gastiganto*.

ÂNFORA — *Amforo* (antikva botelo).

ANFÓTERO — *Amfotera* oksido.

ANFRACTUOSIDADE — *Anfrakto* (Min. Ana.) en roko, korpa organo.

ANGÉLICA — *Angeliko* (Bot. "angelica").

ANGELICAL — *Angela* esprimo.

ANGÉLICO — *Angela* mieno.

ANGELUS — *Horo de angeluso* (Rel.).

ANGIITE — *Angiito* (Med.).

ANGINA — *Angino* (Med.); *brusta angino*; *brustangino*.

ANGIOCOLITE — *Koleangiito* (Med.).

ANGIOLOGIA — *Angiologio* (Med.).

ANGIOMA — *Angiomo* (Med.).

ANGIOSPERMA — *Angiospermo* (Bot.).

ANGLICANISMO — *Anglikanismo* (Rel.).

ANGLICANO — *Anglikano* (Rel.); la *anglikana* religio.

ANGLICISMO — 1. *Anglaĵoj* (moroj, specialaĵoj). 2. *Diri anglismojn* (apartaĵoj de la angla lingvo).

ANGLO — 1. *Englo* (ĝermana tribano en anglujo). 2. *Anglonormanda*; *anglosaka*. 3. *Anglo-franco* (ido de anglo kaj francino aŭ inverse).

ANGOLENSE — *Angola* popolo; *angolano* (loĝ. Angolo).

ANGRA — *Rodo* (eksterhavena kontraŭenta ŝirmejo por ŝipoj).

ANGU — 1. *Maizkaĉo*. 2. *Kuiri kaĉon* (miskuiritaĵo); kota, sanga *kaĉo* (similaĵo al kaĉo).

ANGUIS — *Angviso* (Zoo. "anguis").

ANGULAR — 1. Kun *angula* formo. 2. *Angulŝtono*, *baza ŝtono*, *bazangulo* de konstruaĵo.

ANGULO — 1. *Angulo* de 45 gradoj, de dek gradusoj; formi *orton*; orta, akuta, malakuta, obtuza *angulo*; komplementaj, suplementaj, alternaj *anguloj*; *angulo* de rotacio. 2. Ligi du pecojn per *fiksangulo*.

ANGÚSTIA — 1. Senti *angoron* antaŭ danĝero; *angoro* de agonio. 2. Atendi ion kun *korpremateco*.

ANGUSTIANTE — En *angora* situacio.

ANGUSTIAR — 1. Mia animo *angoras* pro la timego. 2. Tio *korpremis* min.

ANGUSTURA — *Angusturo* (Med.).

ANIAGEM. 1. Sako el *juttolo*. 2. Sin vesti per *sakŝtofo*.

ANIDRIDO — *Aceta anhidrido* (Kem.).

ANIDRITA — *Anhidrito* (Min.).

ANIDRO — *Anhidra* acido.

ANIL — 1. *Indigo* (kolorilo el indigo-planto); *indigokolora*, *indiga*; kun la koloro de *indigo*. 2. *Blugilo* por tolaĵo.

ANILEIRA — *Anilo* (Bot. "indigofera tinctoris").

ANILIDO — *Anilido* (Kem.).

ANILINA — *Anilino* (Kem.).

ANIMADO — 1. *Vigla*, *animita* parolado; *vigla*, *vivoplena* junulo. 2. Poemo *animita* de malamo. 3. Vidi *vivantajn* desegnojn.

ANIMADOR — 1. *Esperiga* promeso; *kuraĝiga* helpo. 2. *Animisto* de radia programo.

ANIMAL — 1. *Animala*, vegetala, minerala regnoj; *animaloj*: homoj kaj bestoj. 2. *Tirbestoj*; *ŝargobestoj*; *virbestoj*; *paŝtobestoj*; *sovaĝbestoj*; *rabbestoj*; *prabestoj*. 3. *Bredi brutojn*; *agi kiel bruto*; *sensenta kiel bruto*; kun *bruta* volupto.

ANIMALESCO — *Besta* inklinio.

ANIMAR — 1. *Animi*, *plivigligi* la feston, konversacion. 2. *Kuraĝigi* alian per sia ekzemplo.

ÁNIMO — 1. En ĝoja, bona *animstato*, *korstato*; momenta *spriststato*; la *animstatoj* estis incititaĵ. 2. Vi ne havas *kuraĝon* por lukti.

ANINHAR — 1. La birdo *eknestis*, *nestigis* sub la tegmento, en truo. 2. La ideo *nestigis*, *ennestigis* en lia kapo; ne *nestigu* tiajn ideojn en lia kapo; la sento profunde *nestigis* en mia koro.

ANION — *Anjono* (Fiz.) kaj katjono.

ANIKUILADOR — *Nentiĝa* armilo.

ANIKUILAMENTO — Savi sin de plena *nentiĝo*.

ANIS — *Anizo* (Bot. "pimpinella anisum").

ANISOCORIA — *Anizokorio* (Med.).

ANISOMETROPIA — *Anizometropio* (Med.).

ANISOSFIGMIA — *Anizosfigmio*.

ANISTIA — Dekreti, promulgi la *amnestion* al ribelintoj.

ANISTIAR — *Amnestii* ribelintojn.

ANIVERSÁRIO — 1. Festi la naskiĝan *datrevenon*; *datreveno* de ies naskiĝo; ies *nakiĝtago*, *naskiĝdato*, *naskotago*; 45a *naskiĝotago*. 2. La fondiĝa *datreveno*; dua *datreveno* de la fondiĝo.

ANJO — 1. *Angelo* Gabriel; *gardangelo*; bona kaj malbona *angelo*. 2. *Angelo* de boneco; adorinda *angelo*.

ANO — 1. Natura, astra, suna, sidera tropika *jaro*; gregoria, julia, civila, lega *jaro*; nova *jaro*, novjaro; superjaro; lernjaroj; en la *jaro* 1975; pasintjare, *ĉi-jare*, venontjare; en la 1930-aj jaroj; multjara esplorado. 2. Li havas 7 *jarojn*; ŝi estas 7-jara; knabo de 7 jaroj; en mia 25a *jaro*; mi estos 60-jara en la venonta monato; hieraŭ estis mia *naskiĝotago*; kiomjara vi estas? 3. Du *lumjaroj*. 4. La *jubileo*, *jubilea jaro* (pilgrimado al Romo).

ANÓBIO — *Anobio* (Zoo. "anobium").

ANODO — *Anodo* (Fiz.) kaj katodo.

ANODONTE — *Anodontoj* (Zoo. "anodonta").

ANOITECER — 1. Jam *vesperigas*, tuj *noktiĝos*. 2. *Vesperigo*; *noktiĝo*.

ANOMALIA — Anomalio (eksternormalaĵo).

ANONIMATO — Sub *anonimeco*.

ANÓNIMO — 1. *Anonima* aŭtoro; *sen-noma* letero. 2. *Anonima* societo.

ANONA — *Anono* (Bot. "anona").

ANOPSIA — *Anopsio* (Med.).

ANORAQUE — *Anorako* (jako).

ANORMAL — 1. *Anormala* inklino; la *anormalulo*. 2. *Nenormala* rezulto, agmaniero; *eksterregula* kresko.

ANOSMIA — *Anosmio* (Med.).

ANOTAÇÃO — 1. Fari *alnoton* sur la pago; legi *notaĵojn* pri la demando; konservi *memornotojn*.

ANOTAR — 1. *Noti* daton, fakton; *noti* al si en la memoro, ke... 2. Legi kaj

prinoti verkon; *alnoti* paragrafon sur la pago.

ANOXEMIA — *Anoksemio* (Med.).

ANOXIA — *Anoksio* (Med.).

ANQUILOSAR — La artiko, genuo *ankilozigis*.

ANQUILOSE — *Ankilozo* ĉe artiko.

ANQUILOSTOMO — *Ankilostomo* (Zoo.).

ANQUILOSTOMOSE — *Ankilostomozo* (Med.).

ANSEIO — 1. Senti *strebon* al poezio; *strebad*o fariĝi poeto. 2. Senti *sopiron* al, pri plezuroj. 3. *Avido* je, al, pri gloro.

ANSIA — 1. Suferi *anksion* (Psi.). 2. *Strebo* al poezio; en sia *strebad*o fariĝi poeto; kun *streĉatendo*. 3. Satigi *avidon* je plezuroj. 4. Senti voman *penadon*.

ANSIAR — 1. *Strebi* al idealo. 2. *Streĉatendi* la respondon; *sopiri* al, pri plezuroj; *sopiri* revidi ŝin.

ANSIEDADE — 1. Maltrankvileco, *anksieco*, angoro. 2. Kun *streĉa* atendo: *streĉatendi* la respondon; *avida* je, al gloro.

ANSIOSO — 1. *Anksia* (Psi.) stato. 2. Homoj *strebantaj* al paco. 3. En *streĉa* atendo; *streĉe* atendi la rezulton. 4. *Avide* deziri plezuron.

ANSPEÇADA — *Ĉefsoldato*.

ANSTROM — *Anstromo* (Fiz.).

ANTA — *Tapiro* (Zoo.).

ANTAGONISMO — La *antagonismo* inter la du.

ANTAGONISTA — *Antagonistoj*, *kontraŭuloj* de la ideo.

ANTÁRTICO — *Antarkta* poluso; en la *antarkto* (regiono).

ANTEBRAÇO — La *antaŭbrako* (Ana.).

ANTECÂMARA — En *antaŭĉambro*.

ANTECEDENTE — 1. Akuzito kun bonaj *antecedentoj*; atesto pri *antecedentoj*. 2. *Antecedentoj* de malsano. 3. La *antaŭrintaj* faktoj.

ANTECEDER — *Antaŭiri* iun al sukceso; tiu fakto *antaŭvenis* lian decidon.

ANTECESSOR — *Antaŭirinto* en la posteno; spertaj *antaŭuloj*.

ANTECIPAÇÃO — Ĝui la vojaĝon kun *anticipo*.

ANTECIPADO — *Anticipa* danko, pago; *anticipe* pagi; kun *anticipa* ĝuo.

ANTECIPAR — 1. *Anticipi* la dankon, pagon. 2. *Anticipi* konkludon pri io. 3. *Antaŭplenumi* ies dezirojn.

ANTEDILUVIANO — *Antaŭdiluva* monstro.

ANTEFIXA — *Antefikso* (Ark.).